**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

Atenton!
La televida elsendo en ZDF pri Paderborn ne okazos la 16.4.75
Vidu sur p. 3!

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 463649; 514269

N-ro 14/1975 - 15 aprilo 1975
Aperas ĉiusemajne

## Esperanto en Bundestag

Bonn (pp). Laŭ propono de la peticia komisiono (Presaĵo 7/3063) la federacia parlamento "Bundestag" en Bonn en sia 143a kunsido de la 23.1.1975 pritraktis peticion de August Wetterstein, Hattingen, pri pli intensa akcelado de Esperanto fare de oficialaj instancoj, de gazetaro, radio kaj televido.

Laŭ la kunsida protokolo n-ro 7/36, aldono 2, la parlamenta ekzameno pri la peticio rezultis jenon:

"Esperanto spertis dum la pasinta jaro pli intensan atenton fare de la federacia registaro. Tio rezultiĝis el la fakto, ke la federacia ministerio pri klerigo kaj scienco en la jaro 1973 transprenis la afergvidadon pri Esperanto-aferoj, kiu ne jam estis reguligita ĝis tiam, interne de la federacia registaro. Per tio unuafoje federacia ministerio oficiale fariĝis kompetenta por la monda helplingvo Esperanto, tiel ke la diversaj naciaj kaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj nun posedas alparol-partneron interne de la federacia registaro.

Sekve de la afergvidado la siatempa federacia ministro von Dohnany transprenis la altan protektadon pri la 59a Universala Kongreso de Esperanto. Lia posteulo en la ofico, federacia ministro Rohde, daŭrigis la altan protektadon. Liaj salutvortoj estas publikigitaj apud tiuj de la federacia kanceliero i.a. en la oficiala kongreslibro. La bulteno "Informationen Bildung-Wissenschaft" eldonita de la ministerio por klerigo kaj scienco publikigis komence de la kongreso la salutvortojn de la federacia ministro al la kongreso.

Ankaŭ alimaniere la federacia ministro pri klerigo kaj scienco jam fariĝis aktiva por Esperanto. Je demando i.a. speciale estis rekomendita la akcepto de Esperanto-estrardelegacio ĉe la federacia prezidento, kiu intertempe okazis.

La federacia ministro pri klerigo kaj scienco cetere regule ricevas informojn pri Esperanto, tiel ke li estas aktuale informita.

El tio rezultiĝis, ke Esperanto spertis pli ol bonvolo fare de oficiala flanko, ankaŭ se tio ne fariĝas konata en la publiko en tioma grado dezirata de interesita flanko.

Plian senperan influon al gazetaro kaj radio tamen eblas nek al la germana parlamento nek al la federaciaj instancoj, ĉar per tio povus esti tuŝata la konstitucie garantiata libereco de la gazetaro. Estas do la afero de ĉiu unuopa federacia civitano, sola aŭ komune kun aliaj utiligi la ekzistantajn eblecojn por influi la gazetaron, radion kaj televidon."

*************

La decido de la parlamento estis transsendita al s-ro Wetterstein komisie de la prezidantino de la parlamento fare de la prezidantino de la peticia komisiono, s-ino Lieselotte Berger, Berlin, la 6an de marto 1975 sub la aktosigno Pet(600) - 7 - 223-9277.

## Nova F.D.P.-iniciato el Paderborn

Paderborn (pp). Je propono de la delegito prof. d-ro Helmar Frank la distrikta partia konferenco de F.D.P. (liberaldemokratoj), distrikto Ostwestfalen-Lippe, sen kontraŭvoĉo kun 1 sindeteno akceptis proponon direktita al la venonta federacia partikongreso rilate al liberala eŭropa lingvopolitiko.

Jen ni prezentas la ĉefan enhavon de la propono:

1) La federacia partikongreso notas kun kontento, ke dum la antaŭparoloj pri konstruo de federacio de liberalaj partioj de Eŭropo oni interkonsentis pri tio, ke la germana lingvo havu la saman rangon kiel la franca kaj la angla.

2) La F.D.P. frakcioj en Bundestag kaj en la landaj parlamentoj same kiel la F.D.P.-ministroj en la kabinetoj estas petataj atenti, ke la germana lingvo ne suferu malutilon en aferoj lige kun la preparoj kaj konstruo de Unuiĝinta Eŭropo.

3) La "Laborrondo por liberala eŭropa lingvopolitiko" estas komisiata prezenti al la federacia partikongreso ellaboraĵon, kiu montras la eblajn alternativojn por gvidlinioj de liberala eŭropa lingvopolitiko kaj kiu ilin komparante prijuĝas. Kondiĉo estu, ke germanlingvanoj en la eŭropa komunumo ne suferu lingvan malutilon kompare kun aliaj E.K.-lingvokomunoj.

Por la motivigo de la propono la proponanto rilatas al la decido de la pasintjara patria kongreso, kiu postulis sub numero 7 la evoluon de lingvopolitika koncepto por Eŭropo. Partio speciale, kiu pledas por egaleco de ŝancoj kaj kontraŭ hereditaj privilegioj, ne devas subteni la konstruon de Eŭropo konsistanta el lingve privilegiitaj popoloj kaj "eŭropanoj duaklasaj".

******************

## Esperanto-agado en Kolumbio

Bogota (gr/pp) Aŭgusto Ochoa, ĵus reveninte al sia hejmlando el Germanio, kie li en Frankfurto sukcese pasigis Esperanto-ekzamenon de la Germana Esperanto-Instituto, nun ree profesoras en la universitato "Gran Colombia" de Bogota. El sia instrupodio kaj kiel prezidanto de la bogota Esperanto-ligo li klopodas disvastigi la Internacian Lingvon aŭ almenaŭ pensigi pri ĝi sen antaŭjuĝoj. Jam funkcias du kursoj, unu en la ŝtata universitato kun pli ol cent partoprenantoj, la alia en la universitato "Los Andes" kun 20 partoprenantoj. Bonajn ŝancojn havas la klopodoj pri aranĝo de radioprogramo almenaŭ duonhora ĉiusemajne.

Private ni eksciis pri familio Ochoa, ke la kvarjara fileto Carlos Daniel ekparolis nian lingvon kaj ke la baldaŭ naskiĝonta dua infano krom la gepatra lingvo denaske parolos ankaŭ Esperanton.

## Homo kaj Informo

Paderborn (pp). Homo kaj Informo estas la titolo de komuna resumaro de diverslingvaj sciencaj revuoj, redaktata de Instituto por Kibernetiko, s-ino B. Frank-Böhringer, D-479 Paderborn, Riemekestr. 62. La resumaro, kies unua numero ampleksas 14 paĝojn, estas parto de diversaj sciencaj revuoj, i.a. ankaŭ de "Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft", eldonita de Schrödel-Verlag, D-3 Hannover-Döhren, Postfach 260620. La abonprezo de la revuo kun la resumaro, kies kontribuaĵoj estas en diversaj planlingvoj, sed ĉefe en Esperanto, estas 29,60 GM por 4 numeroj. Mendu ĉe la eldonejo!

Pri la ZDF-elsendo

Paderborn (pp) Ni eksciis el Paderborn, ke la filmitaj scenoj pri la Esperanto-vivo en Paderborn ne estos emisiitaj merkrede, la 16an de aprilo, kiel ni anoncis en PP n-ro 12/75 p. 2. La elsendo okazos nur la 9an de junio kadre de la sama programo "Menschenskinder".
Plie ni eksciis el Paderborn, ke la germana radiostacio por eksterlando "Deutsche Welle" faris elsendon pri Esperanto en Paderborn, kiun oni disaŭdigos al la tuta mondo.

Demonstracio por Esperanto en Augsburg

Augsburg (pp) El telefona interparolo kun Hermann Schmid dum kunsido de Esperanto-aktivuloj en Augsburg, ni eksciis, ke la 26an kaj 27an de aprilo 1975 okazos publika demonstracio por Esperanto. Sabate, la 26.4. ekde la 9a horo funkcios informstando sub libera ĉielo en la zono por piedirantoj, nome sur Martin-Lüther-Platz, kaj dimanĉe ekde la 11a horo estos tago de malfermita pordo en Augustaneum, Annahof 4.

Libroservo Pickel Nürnberg kaj Pilo-Press ĉeestos kaj informos. Ĉiuj bavaraj esperantistoj kaj ankaŭ eksterbavaraj estas invitataj!

Venu al Augsburg kaj demonstraciu por Esperanto!

Informojn donas Hermann Schmid, 8901 Steppach, Alte Reichsstr. 31 f

*********************

Esperanto en la radio

Malbonŝancon trafis la elsendojn de Vieno kaj Romo en Nürnberg. La kondiĉoj aŭskulti ilin ĉi tie estis ĉi-semajne malbonegaj.

La tagmezaj elsendoj de Berno ĉiam estas bone aŭdeblaj sur kurtondo 49 m. Ges-roj Gacond daŭrigis la recencon de Esperanto en perspektivo kaj D-ro A. Baur parolis pri la svisa pentristo Cuno Amiet, naskiĝinte 1868 en Solothurn.

Varsovio: El Varsovio venis ĝojiga informo! Ekde la nova kadra programo en majo oni povos aŭdi la Esperanto-Ekspreson trifoje, nome dimanĉe posttagmeze, vespere kaj lunde matene!

Magra iomete estis la lasta Esperanto-Ekspreso! Ĉu vere mankas novaĵoj kaj informoj, interesaj kaj atentonkaptaj? La diskutado pri la demando ĉu enkonduki rubrikon por komencantoj, ankaŭ en la Esperanto-Ekspreso, fariĝas enuiga. Ŝajnas al mi, ke pri tiu temo estis dirita ĉio kion oni povis diri. Novaj argumentoj certe ne venos. La komencantoj ellernu Esperanton kaj iom post iom ili certe komprenos la Esperanto-elsendojn. Ĉiuj devis iam komenci.

Regula aŭskultanto, kiu aŭdas preskaŭ ĉiujn elsendojn, rimarkas ankaŭ kelkfojan ripetadon de certaj programeroj.

Certe interesaj estas la politikaj komentarioj kaj felietonoj, kiuj prezentas la polan starpunkton pri problemoj kaj okazaĵoj. Ĉiu aŭskultanto mem devas prijuĝi ilin. Mi mem ne povas konsenti al kelkaj esprimitaj opinioj kaj starpunktoj. Kun malĝojo mi ankaŭ konstatis, ke Federacia Respubliko Germanio fariĝas celo de polemikaj komentoj. La rilatoj inter Pollando kaj FRG ŝajnas esti en sakostrato.
Cetere, mi atentigas pri la anonco sur la lasta paĝo pri la aktuala konkurso de Pola Radio. Partoprenu en ĝi kaj skribu vian sinceran opinion. Tio certe kontribuos al la pli bona interkompreniĝo!

Ĉu vi jam skribis vian poŝtkarton aŭ leteron de la monato, al la Pola Radio kaj al la aliaj radiostacioj? Se ne, faru tuj, faru nun! Se vi jam skribis, skribu duan fojon, morgaŭ aŭ postmorgaŭ, sed certe dum aprilo. La adresojn vidu en PP 13/75 p. 4!

# Konkurso de Pola Radio

En la 1975 j. pasos la 30-a datreveno de la finiĝo de la dua mondmilito. Okaze de la datreveno ni petas pri respondo al jena demando:

**Kiaj pensoj venas al vi lige kun la proksimiĝanta 30-a datreveno de la venko super faŝismo kaj finiĝo de la dua mondmilito?**

Respondo al tiu ĉi demando rajtigas al partopreno en lotado de la ĉefaj premioj en la formo de 10-taga ekskurso tra Pollando kaj de multaj aliaj premioj kaj memordonacoj.

La leterojn ni petas sendi laŭ la adreso: Polskie Radio, PL-00-950 Warszawa, P. O. Box 46, en kovertoj signitaj per la devizo „Konkurso", ĝis la 9-a de majo 1975 j. — decidas la dato de la poŝta stampo.

La rezultojn de la lotado ni anoncas en la disaŭdigoj de la Pola Radio la 15-an de junio 1975 j.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo fiksota de la Pola Radio.

POLSKIE RADIO
Warszawa